



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro 9** > • Financado • Itali. • UK prepare • Albanio • Armenio • <feb 8

## Ebloj financi agadojn kaj reklami nin

*Google Grants* ofertas subvencion ĝis 10 mil dolaroj monate por ne-profitcelaj organizoj je la formo de senpagaj reklamoj ĉe *Google Adwords*.

Tio signifas, ke la asocio ne ricevos monon, sed krediton por fari reklamojn en Google ĝis la menciita valoro. Per tiu granda sumo, vi povos amase disvastigi Esperanton en via lando.

Jam de monatoj mi okupiĝas pri la esplorado de tiu rimedo kaj zorgas pri la akreditigo de Brazila Esperanto-Ligo, kiu jam estas aprobata en du fazoj (el tri) de la procezo.

Se vi interesiĝas pri tiu ebleco, bonvolu kontakti min kaj mi volonte sendos pliajn klarigojn.

Emilio Cid, Estrarano de UEA kaj Komitatano B.

*SMG komentas:* En la posta diskuto ni konstatis, ke pliaj similaj iniciatoj estas. Eluzo de tiuj povos kontribui al la urĝe bezonata rejunigo de niaj komunumoj, precipe tra Eŭropo, Azio kaj partoj de Ameriko.

## Itala debato sekvos baldaŭ

Notu en via agendo la daton mardo la 15a de februaro je la 21.00 itala horo.

Por tio Itala Esperanto-Federacio organizas debaton pri

***Esperanto kaj politiko: ĉu nepre batalema minoritato? Objektiva perspektivo kaj sugestoj por estonto***

kun partopreno de Luigi Fraccaroli, Javier Alcalde, Klara Ertl kaj Vinko Markov.

La seminario okazos per Zoom:

<https://us02web.zoom.us/j/83760145845?pwd=RXd0Vy8rM3JQbUxvNkg4dERWOWIYdz09>

Aliro: 837 6014 5845

Paskodo: 817735

Michela Lipari

# UEA preparas sin por Montrealo



## *Amri Wandel: IKU kaj la Sciencan Kafejo*

Hieraŭ estis la [limdato por proponoj](#) por la Internacia Kongresa Universitato (IKU). Malgraŭ la pandemio estis ricevitaj pluraj altkvalitaj proponoj, kiuj ebligas la okazigon de plena IKU-sesio. Bedaŭrinde, la ĉi-jara rikolto ne sufiĉas por okazigi ankaŭ la popularan Sciencan Kafejon, kiu ekde 2015 okazis seninterrompe.

Konsulte kun kolegoj en la Estraro mi decidis plilongigi la limdaton por proponoj **specife por la Sciencan Kafejo (SK)** ĝis la fino de februaro. Aparte bonvenas proponoj de gejunuloj kaj aktivuloj de TEJO. Proponoj enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon kaj atingi la IKU-sekretarion (Amri ĉe [huji.ac.il](mailto:huji.ac.il)) ĝis 28.2.2022.

Mi memorigu ke la SK konsistas el duonhoraj prelegoj, pli popular-nivelaj ol IKU-prelegoj. Ekde 2022 ankaŭ SK-prelegantoj ricevos **honorarion** (120 Eur) kaj ekde 2021 aperas plena SK-**teksto** en la IKU-libro. Por impresiĝi de la temoj kaj nivelo eblas vidi SK-resumojn en la [IKU-retejo](#) (ekde 2015) kaj SK-tekstojn en la [pasintjara IKU-libro](#) (p.91-118).

## *Claude Nourmont kaj la Kleriga Lundo*

Kiel kutime en la preparo de la programeroj de la UK komence de februaro mi lanĉas alvokon por la Kleriga Lundo. Do mi atendas sinproponojn por tiu programero. Mi unue kontaktos aparte tiujn kiuj kontribuis en 2021. Kaj mi ŝatus ke vi precizigu, ĉu vi pretas roli virtuale, fizike, aŭ en la du situacioj. Ankoraŭ ne tute certas, ĉu la UK fine okazos reale, kvankam optimismaj voĉoj supozas, ke fine ĝi povos okazi en la antaŭvidita Universitato. Ni esperu.

## *Guilherme Fians kaj Mark Fettes: la Esperantologia Konferenco:*

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la **Esperantologia Konferenco de CED en 2022**, sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

La 44-a Esperantologia Konferenco de CED estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste kadre de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo. La ĉi-jara konferenco havos specialan programon por festi la 70-an jariĝon de CED, fokusiĝante je la temo:

**“CED 70-jara: Bilanco pri la Kontribuoj de Esperantologio al Sociaj, Politikaj kaj Lingvistikaj Fakdebatoj”**

La konferenco pritraktos ne nur la agadon de CED tra la tempo, sed ankaŭ kiel interlingvistiko kaj esperantologio ŝanĝiĝis dum tiuj 70 jaroj. Kiam Ivo Lapenna fondis

CED en 1952, ĝia rolo estis ĉefe altigi la reputacion kaj videblon de Esperanto, liverante fakulojn kaj argumentojn kiuj vekis intereson, respekton kaj esploron pri ĝi inter fakuloj kaj en influhavaj medioj. Kiel CED povas plenumi tiujn kaj aliajn rolojn nuntempe? Kiel nun statusas Esperanto kiel studobjekto inter esploristoj?

La konferenco okazos en tri partoj: la unua konsistos el prelegoj kaj atestoj de invititaj fakuloj kiuj partoprenis la historion de nia Centro de Esploro kaj Dokumentado. La dua parto enhavos dudek-minutajn referaĵojn. La tria parto enhavos rondan tablon, malferman al ĉiuj ĉeestantoj, pri kiel oni spertas la akcepton (aŭ malakcepton) de Esperanto-rilataj studobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, antropologio kaj literaturaj studoj, kaj kiaj novaj ebloj malfermiĝas por faka kaj interfaka laboro.

**Ni invitas fakulojn - aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn - sendi proponojn** pri referaĵoj por la dua parto de la konferenco. La referaĵoj povas rilati al la konferenca temo aŭ trakti aliajn temojn kiuj koncernas interlingvistikon kaj esperantologion. La proponoj - enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn - devas esti sendataj al la retadreso de la organizantoj:

[guilhermefians@ce@gmail.com](mailto:guilhermefians@ce@gmail.com) kaj [mtfettes@sfu.ca](mailto:mtfettes@sfu.ca). Ni petas ke la proponantoj indiku ĉu ili intencas prezenti ĉeeste aŭ virtuale. Selektitaj kontribuoj havos oportunon aperi kiel artikolo en la faka revuo *Esperantologio* / Esperanto Studies.

La limdato por proponoj estas la **15-a de aprilo 2022**.

Por kontroli la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu [la retejon de CED](#).



## Novjaro por niaj aziaj komercistoj

Jam okazis la 51a DK (Dimanĉa Kunveno) kun 56 partoprenantoj el diversaj landoj kiuj festas la azian novjaron. La festo apartenas ne nur al la ĉino, laŭleĝe ankaŭ al Koreio, Mongolio, Vjetnamio, Indonezio, Malajzio, Tajlando, Filipinoj, Singapuro. Ĝi estas Novjaro (Njan) de Orientazio laŭ tre aĝa legenda kalendaro de la huna tribo el antaŭ 4000 jaroj. Mi kiel komercisto opinias ke en la mondo ju pli da festoj, des pli bonaj ŝancoj por la komerco kaj ekonomio! Mi esperas ke ĉiuj vivus en la festa mondo. La sekva 52a DK kiel distra festokunveno okazis la 6an de Februaro 2022.



## Poezia bukedo el Ĉinio

Jen mirinda eldonaĵo el Ĉinio por poezi-amantoj. Ni alkroĉas la revuon *Panseo*, numero 364. Bv. aprezi la versojn el kontribuintoj el la tuta mondo!

## Oni en Armenio kunvenas sed malfacile prosperas

ILEI kontaktas sekciojn. Venis respondo: "Mi dankas vin pro mesaĝo kaj deziro aktivigi la ILEI-movadon en niaj landoj. Bedaŭrinde nun, pro virusa kaŭzo kaj politika nestabila situacio en nia regiono nia aktiveco estas en dorma stato, kaj ne nur de ILEI, ankaŭ la landa asocio. Dume ni provas ne perdi tion, kion havas. Sur la foto videblas festado de Zamenhof-tago, ĉeestis grupeto de armenaj geesperantistoj.

Lida Elbakjan, Armenio. Erevan.



## Esperanto en albana televido

La unuan de februaro 2022 de 9:35 ĝis 9:55 la unua kanalo de la albana ŝtata televido TVSH1, invitis la junan esperantiston 16-jaran Juri Andoni, kaj lian parenclon Lefta Hito, simpatianton de Esperanto por rakonti pri la internacia lingvo. La elsendo sekvas tiun de alia privata kanalo SCAN la 4-an de decembro 2021 pli la sama temo. La ĵurnalistoj Elsa kaj Endri demandis pri la naturo de Esperanto, deveno, lernfacileco, tradukebleco kaj disvastigxo enlande kaj enmonde

===== vortoj: 1100 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2021 (per EKO 2021-58).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.